



MARTINUS
INSTITUT

Kosmos

LA KOSMOLOGIO DE MARTINUS

Martinus:

La vojo al Ŝangrilao

Ole Therkelsen:

Rilate al Ŝangrilao

L.L. Zamenhof:

La oka kongres-
parolado

Renato Corsetti:

Kiom ni povas lerni
de Zamenhof?

Jens S. Larsen:

Dana lingvisto Rasmus
Rask


Ole Therkelsen:

96-a UK en Kopenhago

Erik Gerner

Larsson:

Martinus 7



Lost Horizon (Horizonto Perdita) estas la titolo de la romano verkita en 1933 de la brita verkisto James Hilton (1900-1954). Li enkondukis la nomon *Ŝangrilao*, kiu estas fikcia monaĥejo en izolita, paradiza valo en Himalajo. En la festparolado okaze de sia 79-jara datreveno Martinus rakontis pri *Ŝangrilao* en la filmo *Horizonto Perdita*, kiu aperis en Hollywood en 1937. La parolado de 1969 estas eldonita sub la titolo *La vojo al Ŝangrilao*.

Dua artikolo estas la lasta kongresparolado de Zamenhof dum *La Oka Kongreso Esperantista en Kraków*. Ĝis la 8-a kongreso (Krakovo 1912) oni nomis la kongreson "Internacia" kaj ekde la 9-a "Universala" (Berno, Svislando 1913). La parolado en Kraków temis pri la 25-jara jubileo de Esperanto (1887-1912). La homaj kvalitoj de Zamenhof estas konataj al multaj esperantistoj: humileco, mildeco, hom-amo, helpemo. Li diris, ke li ne volis esti ĉefo de la Esperantomovado, kaj li petis al la kongresanoj:



Ludoviko kaj Klara partoprenis en ĉiu kongreso 1905-1913.




“Ĉesu vidi en mi Majstron, ĉesu honori min per tiu titolo”.

La sekva Universala Kongreso en 1913 estis la unua kongreso, kie Zamenhof nur partoprenis kiel simpla kaj ordinara esperantisto. Kiam li akceptis oran medalon kaj bukedon, li diris: “Esperanto jam ne plu dependas de iu sola homo, nek de iu sola aro da homoj, por sia sukceso. Homoj povas veni, kaj homoj povas iri, sed Esperanto daŭrigos ĝis la idealo pri internacia lingvo, kuniganta ĉiujn popolojn per ligo de komuna komprenado, estos atinginta sian venkan realiĝon por la bono de la tuta homaro.”

Poste venis unua mondmilito ĵus antaŭ la planita UK en Paris somere 1914, kaj dum la milito Zamenhof forpasis en 1917.

Ole Therkelsen



La vojo al Ŝangrilao

de Martinus

*Parolado okaze de 79-jara naskiĝtago
de Martinus la 11.08.1969*

1. Dankon al ĉiuj kiuj helpis al la Afero

Mi plej elkore kaj profunde dankas vin ĉiujn pro tiu ĉi agrabla vespero, kiun vi donis al mi. Ĝi estos al mi tre inspira en la daŭrigado de mia laboro, kaj mi dankas al vi ne nur pro tiu ĉi vespero, sed ankaŭ pro la helpo kiun mi estas ricevinta dum la jaroj. Ekde la komenco, amaj homoj ĉirkaŭas mian laboron, mian kreadon de la analizoj kaj la prelegojn, kaj sen tiu rondo de amaj homoj, la Afero ne estus tiel progresinta, kiel ĝi nun estas.

2. La Afero ne estas sekto – La Afero estas Ŝangrilao

Sed kia do estas tiu rezultinta Afero? Kio estas la kaŭzo, pro kiu homoj subtenis min? Kion ni havas? Ĉu ni havas ion por oferti al la homoj? Jes, certe! Nia Afero ne fariĝis sekto; ĝi certe fariĝis *Afero*, pli ol Afero: *Ĝi estas Ŝangrilao!*

En la filmo “Horizonto Perdita” (Lost Horizon, 1937) estis tiel, ke la homoj en Ŝangrilao posedas prakulturan scion, kiu povas savi la mondon. Ni povas kun plej altgrada certeco diri, ke ni posedas la scion, de kiu dependos la estonteco de la homaro. Mi povas tion diri kun

kompleta certeco, ĉar mi scias, ke nun al la homaro estas donitaj ĉiuj informoj bezonataj por ke la vivmistero riveligu al la homa inteligento, sen ke la tiucela studado postulas intuicion. Ni *estas* tia Ŝangrilao kaj ni *havas* tian Ŝangrilaon ĉi tie. Ni havas la plej altan scion. Ni havas tion kio fariĝos la kultura fundamento de la estonteco.

3. La longa kaj peniga vojo al Ŝangrilao

Sed ne estas tiel facile alveni al tiu Ŝangrilao. Kiel ni vidas en la filmo, necesas superi altajn montopintojn kaj rokformaĵojn, kaj tiuj, kiuj alvenis al Ŝangrilao, venis tien nur per granda penado kaj klopodo. La Ŝangrilao, kiun konsistigas la kosmaj analizoj, ankaŭ estas io ne tuj atingebla. Estas multaj homoj, kiuj tute ne povas fari tiun mi gradon, kiuj tute ne povas vidi la kosmajn analizojn. Ekzistas homoj por kiuj la analizoj estas nenio krom presinko sur papero. Kosme rigardite tiuj homoj estas analfabetoj, sed pro tio oni ne povas riproĉi ilin.

Simbole rigardite, du trionoj de la homaro estas spiritaj analfabetoj, kaj unu triono bone survojas al Ŝangrilao.

En tiu triono de la homaro ni trovas la multajn sektojn kaj religiajn komunumojn. Ili ĉiuj unuope havas siajn proprajn konceptojn, kiuj pli aŭ malpli devias de la reala vero, sed ili ĉiuj havas iom de la vero. Ili ĉiuj havas diversajn rokkrutaĵojn kaj montodeklivojn por superi antaŭ ol alveni al la vera Ŝangrilao, t.e. al la efektiva vero pri la vivo, sed ili ĉiuj survojas. La du trionoj de la homaro, kiuj, por tiel diri, ankoraŭ ne komencis sian vojaĝon, estas prilaborataj de Dio kaj de sia karmo, kiu venas en la mondon kaj rezultigas ke la progreso estos rapida. Ili do trairos la malhelan sorton kiun ili kreis en sia primitiva stato.

4. Kelkaj homoj jam estas supre ĉe la pordo de Ŝangrilao

Tiuj, kiuj apartenas al la unua triono jam estas trairintaj sian malhelan karmon. Ili ne plu volas militadi nek havi ajnan rilaton kun militarismo. Ili ne plu povas elteni fari malbonon al bestoj, manĝi viandon kaj ĝenerale ĝeni kaj fari malbonon. Ĵaluzo kaj simile estas por ili forlasitaj tendencoj.

Ĵaluzo, netoleremo, envio, malamo kaj venĝemo estas la rokkrutaĵoj, kiujn oni devas superi por povi alveni al tiu Ŝangrilao, kiun ni konas. Tiel oni komprenas, ke al tiuj multaj homoj en la lastaj du trionoj ankoraŭ restas kelkaj penaĵoj, kiujn ili devas trairi. Ili devas superi siajn superstiĉojn kaj erarajn dogmojn, de kiuj ili ankoraŭ dependas. Sed ili ĉiuj atingos la celon, ili ĉiuj survojas.

Ekzistas homoj kiuj progresis tiom, ke ili malsatas kaj soifas je la kosmaj analizoj. Tiuj ĉi analizoj plene kongruas kun iliaj deziroj, avido kaj sopiro je la dieca, kaj tiuj homoj jam estas ĉe la pordo de Ŝangrilao. Tiun pardonon oni povas egaligi al kosmaj ekbriloj. Iom post iom laŭ la evoluo de ilia amkapablo, ili ekhavas kosmajn ekbrilojn. Ili komencos

ekvideti tiun Ŝangrilaon, tio estas, ili komencos povi vidi senmortecon, percepti intuicie kaj sperti ke oni “*amuisian proksimulon kiel sin mem*” por povi fariĝi “*la finkreita homo*”. Tiuj, kiuj atingis soifadon je la kontentigo, kiun donas la kosmaj analizoj, estas atingontaj la celon de la vojaĝo.

5. La militoj ruinigas sin mem.

La kruda kaj malpli kruda karmo

Estas tre kuraĝige scii, ke tiu parto de la homaro ne bezonas timi la venontajn militojn. Militoj ja venos – ili estas nemalhaveblaj, ĉar ja estas evidente ke tiuj du trionoj de la homoj, kiuj volas militi kaj kredas, ke militado estas io necesa, kaj ke eblas malhavigi militon per milito, ili ja gustumu la militon tiel multe, kiel ili volas. Sed la milito kun ĉiuj ties suferoj kaj malfeliĉoj ja havas tiun dian econ ke ĝi rezultigas kapablon, kies efiko estas, ke oni ne povas elteni fari malbonon. La venontaj militoj ruinigos sin mem, kaj ankaŭ tiuj ĉi homoj fariĝos migrantoj survoje al tiu ĉi Ŝangrilao, al la kosmaj analizoj, kaj tio estas io, kio okazos rapide, kompare kun la ĝisnuna evoluo. La mondo aŭ la homaro iras antaŭen en giganta eksploda evoluo. Nuntempe homoj preskaŭ evoluas pli en dek jaroj ol ili antaŭe evoluis dum jarcento aŭ pli. La evoluo nun ege rapidas.

Por tiuj, kiuj serĉas la kosmajn analizojn, gravas neniam forgesi tion, kio kondukos ilin antaŭen kaj supren. Ĉar eĉ se ili jam trapasis la malhelan karmon, ili ja ne liberiĝis de karmo. La malhela aŭ severa karmo kreiĝas pro murdo, mortigo, torturo kaj simile, kion oni kaŭzas al aliaj. Tiu ĉi karmo ja siavice revenas en la formo de murdo, mortigo, torturo ktp. Al la homoj kiuj trapasis ĝin, nur restas malpli severa formo de karmo. Eĉ se ili serĉas la kosmajn analizojn, kaj eĉ se ili atingis teorian komprenon de la analizoj, tio ja ne

signifas, ke ili plene liberiĝis de karmo. Ili ankoraŭ havas manketojn kaj aferetojn, kiuj ankoraŭ ne estas finkreitaj, kaj kiuj kaŭzos karmon. Sed temas pri malpli kruda karmo. La granda karmo, kiun venigos la venontaj militoj, trafos ĉiujn tiujn homojn, kiuj kreas la militojn.

6. La pioniroj de la nova mondkulturo

Multaj homoj en la unua triono kaj precipe tiuj, kiuj estas atingintaj la kosmajn analizojn, ne plu emas aparteni al sektoj kaj fariĝis liberaj homoj. Ili ne estas katenitaj de unuiĝoj. Oni ne povas kateni scion ene de unuiĝo. Scio estas io, kio estas donita al la homoj, iom post iom, laŭ la evoluo de ilia ricevemo. La kosmaj analizoj estas destinitaj por tiuj homoj, kaj ili estas pioniroj por la nova mondkulturo.

Gravas ne forgesi, ke oni ekhavis eblon subteni kaj travivi ĉi tiun dian rivelon de la mondkoncepto, la diajn leĝojn kaj la kompletan solvon de vivmistero. Estus ankaŭ bone se oni memorus ke oni mem kontribuas al tio, ke ankaŭ aliaj homoj povos travivi la samon, kaj tion oni povas fari ĝuste per ekuzo de *la preĝo*.

7. Estas bona kutimo preĝi ĉiutage

Kristo instruis al ni, ke oni povas preĝi ĉie ajn, kaj ke *“oni ĉiam preĝu kaj neniam laciĝu”* (Luk.18.1). Por preĝi ne necesas genuiĝi. Dio ne estas tia ulo, kiu diras: *“Falu surgenuen”*. Dio ne estas tiel etanima, ke li postulas, ke oni interplektu la manojn, prenu certajn poziciojn aŭ faru specifajn ceremoniojn. Oni nur bezonas sendi sian penson supren, eĉ la plej malgranda ĝemo estos aŭdata. Ekzistas tuta aro da altevoluintaj, iniciataj estuloj, kiuj estas la iloj de Dio por konduki la mondliberigadon antaŭen, kaj kiuj estas iniciataj por aŭskulti la preĝojn de ĉiuj homoj.

Estas bone preĝi ĉiutage – oni povas komenci novan tagon per preĝo, kaj oni povas preĝi antaŭ ol enlitiĝi. Ĉiun vesperon antaŭ ol enlitiĝi, mi preĝas kaj dankas por la tagnokto, kiu pasis, kaj mi daŭre preĝas, ke mi diru kaj faru la ĝustajn aferojn. Mi ankaŭ uzas la preĝon, kiam mi estas interparolonta kun homoj kiuj estas malfeliĉaj, kiam mi estas prelegonta aŭ laboronta pri ĉiuj tiuj aferoj, kiujn mi transdonu al la homoj. Mi preĝas al Dio, ke ne enmiksiĝu io, kio povus fari damaĝon, sed ke ĉio estu je beno. Estas bonege akiri tiun kutimon!

8. Ni havas kunnaskitan sekretĉambreton en nia propra konscio

Oni povas preĝi, kiam oni sidas en aŭto, kiam oni parolas kun aliaj homoj aŭ ĉeestas kunvenon. Oni ĉiam povas sendi preĝon supren, oni ĉiam povas fermi la pordon de sia ĉambreto. Kristo ja diras: *“Kiam vi preĝas, eniru en vian ĉambreton, kaj ŝlosinte vian pordon, preĝu al via Patro, kiu estas en sekreto; kaj via Patro, kiu vidas en sekreto, vin rekompencos”* (Mat. 6.6).

Jes, oni povas eniri en sian ĉambreton kaj esti sola, kaj tie oni povas preĝi. Sed estas iom ĝene, ĉar ne ĉiuloke oni povas aliri tian ĉambreton. Feliĉe, ni havas kunnaskitan ĉambreton en nia propra konscio. Ni povas sendi preĝon al Dio, eĉ ĉirkaŭitaj de kiom ajn da homoj, sen ke ili povas tion rimarki, kaj tion ni povas fari tute trankvile. Ĉiam konstante havi la preĝon en la konscio, tion mi rekomendus al ĉiuj tiuj homoj, kiuj nun estas atingintaj tion, ke ili havas intereson pri la kosmaj analizoj, kaj kiuj kunhelpas antaŭenigi la tutan novan mondkulturon.

9. La preĝo efikas eĉ se oni ne kredas je ĝi

Oni eĉ ne bezonas kredi je la preĝo – ĝi ĉiuokaze efikas. Ankaŭ tio, ke necesas

kredi, estas superstiĉo, tio ne estas io necesa. Sed por multaj homoj preĝi estas io tute nova. Kiam malfeliĉaj homoj venas al mi, mi demandas: “Ĉu vi ne preĝas al Dio?” – “Preĝi al Dio? Ne, mi ne povas preĝi Patro nia, ĉar tro da pensoj intermiksiĝas en Patro nia.” – “Jes, sed vi ja ne bezonas preĝi Patro nia. Vi ne bezonas preĝi longan frazaĵon. Se vi estas en malagrabra situacio, vi simple povas pensi, ĉu vi povus ricevi helpon venki tiun ĉi malagrablan situacion. Tion vi povas fari sendante vian penson al Dio. Faru tion, eĉ se vi ne kredas je tio! Faru tion ĉiuokaze! – Kaj vi spertos, ke tio efikos.”

10. La ĉiutaga preĝo donas grandan senton de sekureco

Kiam oni preĝas ĉiutage, tio fariĝas viva realaĵo, kiun oni ne povas malhavi. Oni ĉirkaŭiros en la mondo kun grandega sento de sekureco. Kiam oni kunhavas Dion en ĉiuj siaj agoj, tiam oni estas levata super ĉiu angoro aŭ timo, sendepende de kion oni renkontas. En tiu ĉi maniero oni ĝuste povas venki ĉiujn tiujn rokojn, rifojn kaj krutajn murojn, kiujn mi antaŭe menciis, kiuj en formo de netoleremo, malamo, envio kaj ĵaluzo kuŝas kiel baroj sur la vojo antaŭen. Per la potenco de la preĝo oni ricevas grandegan helpon venki tiujn ĉi aferojn kaj agordiĝi kun la kosmaj analizoj kaj tiel agordiĝi kun la ĉioamo, kiu estas la eterna lumo, kiun ni devas atingi por fariĝi “la homo laŭ la bildo de Dio”.

11. Per uzado de la preĝo oni povas ekami siajn malamikojn

Oni preĝu al Dio, eĉ se oni opinias, ke oni ne havas bezonon je tio. Oni tamen ĉiam povas sendi la penson supren, kaj oni spertos, ke oni per tio kultivas talenton, kiu kreas vivan kontakton inter la dia Providenco kaj oni mem. Oni

spertos, kiel la angoro kaj la timo malaperas, kaj oni vivos en dieca sento de sekureco. Tio ankaŭ efikas tiel, ke oni fariĝas granda utilo, ĝojo kaj beno por aliaj homoj, kaj tio ja estas tio, kio oni estu. Oni povas precipe uzi la preĝon por ekami siajn malamikojn. Estas facile ami tiujn, kiuj kondukas amoplene al oni mem, sed la granda problemo, la plej granda muro aŭ plej granda baro estas, *ke la homoj ne amas siajn malamikojn*, ke ili ne benas tiujn, kiuj malbenas ilin. Sed per la potenco de la preĝo ili do povas ekhavi helpon por venki ĉi tiujn krutaĵojn kaj rokojn.

12. Dio parolas al ni per ĉiuj homoj

Ankoraŭfoje mi kore dankas al vi pro tiu ĉi ege agrabra vespero, pro ĉiuj amesprimoj kaj la helpo kaj subteno, kiujn vi daŭre donas al mi. Tio donas al mi profundan senton de sekureco, same kiel mia rilato al Dio realigas en mi grandegan senton de sekureco. Mi vidas Dion en Vi, kaj Dio ja parolas al mi pere de Vi. Dio ja ne kapablas paroli al mi per nenio, sed ja parolas per ĉiuj tiuj homoj kiuj reagis al mia parolo. Oni devas lerni kompreni, ke gesinjoroj Hansen, Pedersen kaj Sørensen estas la iloj de Dio, ke Dio parolas pere de ĉiuj homoj. Oni ĉiam staras antaŭ la parolo de Dio, sendepende de la individueco de la renkontata homo, kaj ankaŭ ĉi-kaze oni disponas je la preĝo kiel helpilo. Per tio mi volas diri: “Dankegon pro tiu ĉi agrabra vespero!”

Martinus faris dankparolon okaze de sia 79-a naskiĝtago la 11-an de aŭgusto 1969 en la restoracio Josti, Frederiksberg. La dana teksto estas prilaborita de Ole Therkelsen kaj aprobita de la konsilio en 1993. “Vejen til Shangri-La” aperis en dana Kosmos n-ro 8-1993. Tradukis Henning Sato von Rosen kunlabore kun Hokan Lundberg kaj Sonja Petrovič Lundberg en 2011.

Rilate al Ŝangrilao

de Ole Therkelsen



La 11-an de aŭgusto 1969 pli ol 170 amikoj celebris la 79-jaran datrevenon de Martinus en restoracio Josty, kiu bele situas en la parko *Frederiksberg Have*. (Pile Allé 14A, DK-2000 Frederiksberg). Meze sur la foto Martinus videblas antaŭ la meza fenestro. La festparolado de Martinus estis surbendigita, surpaperigita kaj poste prilaborita por skriba eldono sub la titolo: *La vojo al Ŝangrilao*.

Martinus vidis la filmon pri Ŝangrilao *Horizonto Perdita*, kiu en 1937 estas farita en Hollywood surbaze de la libro *Lost Horizon* de James Hilton (1900-1954). La libro eldoniĝis en 1933 – cetere samtempe kiel revuo Kosmos. Ĉu sama nova mondimpulso? Komence la dana titolo de la libro estis *La valo*

de blua luno, sed poste *Ŝangrilao – Horizonto Perdita*.

En la libro Ŝangrilao estas mistera, fabela, paradiza valo sub la ĝentila gvidado de monaĥejo en la okcidenta parto de la montaro Kunlun en Himalajo. Ŝangrilao estas sinonimo de tera paradizo, sed specife de mita himalaja utopio – ia daŭre feliĉa lando, izolita de la ekstera mondo.

James Hilton ricevis inspiron de artikoloj en la revuo “National Geographic” pri Tibeto kaj de la priskribo de “Shambhala” en tibeta budhismo.

La ĉefa persono en la libro estas la angla konsulo Hugh Conway, kiu kune kun aliaj civilaj loĝantoj devas fuĝi per aviadilo pro intercivilitana milito en la fora oriento. La aviadilo difektiĝas kaj



La 79-jara nakskiĝtago en Josty, kie Martinus videblas antaŭ la meza fenestro.


devas surteriĝi sur la tibeta altebenaĵo, kie la helpobezonaj pasaĝeroj estas savitaj de grupo da homoj de la lamaa monaĥejo *Ŝangrilao*.

Conway estas 37-jara, fraŭla, bone-dukita, saĝa kaj li ne havas ambiciojn. Li satiĝas pri milito kaj pri milito inter politikaj kaj religiaj opinioj. Li satiĝas pri batalo pri mono, potenco, pozicio, honoro kaj favoro de la alia sekso. Conway, kiu poste estas elektita kiel la sekvanto de la grandlamao, estas kun kosmologia esprimo polusevoluinta humana verserĉanto.

Laŭ la aŭtoro, James Hilton, la grandlamao havas vizion pri venonta kolapso de nia mondo:

“La grandlamao antaŭvidis epokon, kiam la homoj bonedukitaj pri murda tekniko furiozos kun tia brutaleco en la mondo, ke ĉio bela, agrabla kaj subluma riskas neniigon, ĉia libro, pentraĵo kaj harmonio, ĉia trezoro bonkonservita dum jarmiloj, la malfortuloj, la sentemaj, la sendefendaj, ĉio estos detruita. La uragano fariĝos tia, ke la mondo neniam antaŭe vidis ion similan. Estos nenia saviĝo pere de armiloj, nenia helpo pere de la potenculoj, nenia respondo en la scienco. La uragano furiozos ĝis la plej malgranda floro en la ĝardeno de la kulturo estas tretplatigita, kaj ĉio homa estas perdita en ĥaoson. – Tial la monaĥejo *Ŝangrilao* estas kreita. – Ĉi tie ni daŭre konservas niajn librojn kaj nian muzikon kaj niajn pensojn. Ni konservas la rafinadon de mortinta epoko, kaj samtempe ni serĉas tiun saĝon, kiun la homoj bezonas, kiam ili rekvietiĝos, kiam la fortuloj jam voris unu la alian. Tiam la kristana instruo estos pravigita, kaj la malfortuloj posedos la teron.”

Estas interese, ke en la parolado Martinus diras, ke nia afero estas tia *Ŝangrilao*. Tio signifas, ke la spirita scienco estos la kerno kaj la bazo de tiu



Franca traduko de *Horizonto perdita*

nova mondkulturo, kiu rekonstruos la mondon post la kataklismo de la tria mondmilito. La Kosmologio de Martinus enhavas la solvon de la vivmisterio. “La Tria Testamento” kondukos la kristanisman al perfektigo kaj la fina venko.

Conway estas kiel la ceteraj teraj homoj “vundita rifuĝinto” inter du regnoj: la besta regno kaj la vera homregno. La monaĥejo *Ŝangrilao* en la libro korespondas al la vera homregno. Ĉar Conway ankoraŭ ne estas fina homo, li refalas (vidu *Livets Bog*, vol. 1 §125). Pro tentigo kaj enamiĝo li forlasas la paradizan monaĥejon favore al la terhoma mondo. Poste pere de siaj malagrablaj spertoj li komprenas, ke li eraris, kaj do li klopodas “venki ĉiujn rokojn, rifojn kaj krutajn murojn” por denove atingi la perditan paradizon en *Ŝangrilao*.

La Oka Kongreso Esperantista

Parolado de Zamenhof la 11.08.1912



La unuaj vortoj, kiujn mi volas hodiaŭ eldiri al vi, karaj samideanoj, estas vortoj de kora gratulo, ĉar ni havas hodiaŭ grandan feston. Ĵus finiĝis dudek kvin jaroj de la tempo, kiam – post longa naska preparado – aperis publike la lingvo, kiu nin ĉiujn unuigas, por kiu ni ĉiuj laboras kaj kiu enkorpigas en si tiun homofratigan ideon, kiun la plimulto el ni havas en sia koro kaj kiu dum dudek kvin jaroj flame instigadis nin labori, malgraŭ ĉia malfacileco kaj ĉiuj malhelpoj.

Dudek kvin jaroj da laborado por Esperanto kaj por ĝia ideo! Tion povas plene kompreni nur tiuj personoj, kiuj partoprenis en tiu laborado de la komenco ĝis nun. Bedaŭrinde tre nemultaj estas tiuj personoj. El la laborantoj de la unua tempo tre multaj jam delonge plu ne vivas, aliajn lacigis la malfacila, grandan paciencon kaj persistecon postulanta vojo, kaj ili malaperis el nia anaro. El tiuj personoj, kiuj troviĝas nun en ĉi tiu ĉambrego, la grandega plimulto en la unuaj jaroj de Esperanto nenion sciis pri ĝi aŭ neklare aŭdis pri ĝi nur kiel pri ia freneza, mokiinda kuriozaĵo; tre multaj el vi en la momento de la apero de Esperanto estis ankoraŭ infanoj; multaj, kaj certe ne la malplej fervoraj el vi, en tiu tempo eĉ tute ne ekzistis ankoraŭ en la mondo. La grandega plimulto el vi aliĝis al nia Afero nur tiam, kiam ĝi estis jam sufiĉe forta kaj elprovita. Tre kaj tre malgranda, facile kalkulebla per la fingroj, estas la nombro de tiuj personoj, kiuj iris

kun Esperanto de la momento de ĝia naskiĝo ĝis la nuna tempo. Kortuŝite ili povas nun rememori, kiel terure malfacila estis ĉiu paŝo en la komenco, kiam ĉiu aludo pri Esperanto postulis specialan kuraĝon, kiam el ĉiu milo da semoj, kiujn ni en plej primitiva maniero, sen helpo kaj sen rimedoj, paciencie ĵetadis en la teron, apenaŭ unu ricevis radikojn.

Dudek kvin jaroj! Grandegan gravecon havas tia peco da tempo en la historio de lingvo artefarita. Lingvoj naturaj kreskas tute trankvile, ĉar kun tia lingvo neniu kuraĝas fari iajn eksperimentojn aŭ fleksi ĝin laŭ sia gusto; sed pri lingvo artefarita ĉiu opinias, ke li havas rajton de voĉo, ke li povas aŭ eĉ devas direkti la sorton de la lingvo laŭ sia kompreno. En lingvo natura ĉiu eĉ plej granda efektiva malbonaĵo nenion incitas, eĉ nenion meditas, kaj estas akceptata kun plena kontenteco aŭ rezignacio; en lingvo artefarita ĉio ŝajnas al ni kritikinda, ĉiu bagatelo, kiu ne estas konforma al nia gusto, pikas al ni la okulojn kaj vekas deziron de refarado. Lingvo artefarita dum longa tempo estas elmetata al senĉesaj ventoj, al senĉesa tirado kaj puŝado. Kiom da ventoj, kiom da senĉesa tirado nia lingvo devis suferi dum sia dudekkvin-jara vivo! Se ĝi tamen ĉion sane eltenis, se malgraŭ ĉiuj ventoj kaj puŝoj ĝi dum dudek kvin jaroj vivis kaj kreskis regule kaj rekte, ĉiam pli fortiĝante kaj riĉiĝante, neniam fleksiĝante aŭ kripliĝante, neniam minacante disfali

en dialektojn, sed ĉiam pli kaj pli fortikigante sian tute difinitan, ĉie egalan spiriton, neniam perdante hodiaŭ, kion ĝi akiris hieraŭ, – ni povas pri tio sincere nin gratuli.

Antaŭ dudek kvin jaroj mi timeme demandis min, ĉu post dudek kvin jaroj iu en la mondo scios ankoraŭ, ke ekzistis iam Esperanto, kaj – se Esperanto vivos – ĉu oni tiam povos ankoraŭ kompreni ion, kio estis skribita en Esperanto en ĝia unua jaro, kaj ĉu angla esperantisto povos kompreni esperantiston hispanan. Nun pri ĉi tio la historio donis jam plenan kaj perfekte trankviligan respondon. Ĉiu el vi scias, ke verko, skribita en bona Esperanto antaŭ dudek kvin jaroj, en plena mezuro konservas sian bonecon ankaŭ nun, kaj la legantoj eĉ ne povas diri, ke ĝi estas skribita en la unua jaro de ekzistado de nia lingvo; ĉiu el vi scias, ke inter la stilo de bona angla esperantisto kaj la

stilo de bona hispana esperantisto en la nuna tempo ekzistas absolute neniam diferenco. Nia lingvo konstante progresas kaj riĉiĝas, kaj tamen, dank' al la reguleco de sia progresado, ĝi neniam ŝanĝiĝas, neniam perdas la kontinuecon kun la lingvo de tempo pli frua. Kiel la lingvo de homo matura estas multe pli riĉa kaj pli elasta, ol la lingvo de infano, kaj tamen la lingvo de ĝuste parolanta infano neniam diferencas de la lingvo de homo matura, tiel verko, skribita en Esperanto antaŭ dudek kvin jaroj ne estas tiel vortoriĉa, kiel verko skribita en la nuna tempo, kaj tamen la lingvo de tiu tempo perdis absolute nenion el sia valoro ankaŭ en la nuna tempo.

Lingvo, kiu eltenis la provon dum dudek kvin jaroj, kiu en plej bona kaj ĉiam pli floranta stato travivis jam tutan homan generacion kaj estas jam pli maljuna, ol multaj el ĝiaj uzantoj, kiu



Ludoviko kaj edzino Klara estas sidantaj. Starantaj: Carlo Bourlet apud la filino de Sofja Zamenhof en Krakovo 1912



S-roj Zamenhof, Sebert, Boirac kaj Van der Biest en Krakovo 1912

kreis jam grandan, potence kreskantan literaturon, kiu havas sian historion kaj siajn tradiciojn, sian tute precizan spiriton kaj siajn tute klarajn idealojn, – tia lingvo ne bezonas jam timi, ke io pere-ige depuŝos ĝin de tiu natura kaj rekta vojo, laŭ kiu ĝi evoluas. La vivo kaj la tempo garantiis al nia lingvo naturan forton, kiun neniu el ni povas senpune malrespekti. La hodiaŭa jubileo estas festo de tiu vivo kaj tempo.

Por ke ni, vivantoj, povu festi la hodiaŭan jubileon, fervore kaj sindone laboris multaj personoj, kiuj nun jam ne vivas. Nia morala devo estus rememori ilin en la nuna solena momento. Sed ho ve! ilia nombro estas tro granda, por ke ni povu ilin ĉiujn citi, kaj krom tio la pli granda parto el ili laboris tiel modeste, ke ni eĉ ne scias iliajn nomojn. Tial, por ne fari maljustan apartigon inter eminentuloj kaj ne-eminentuloj, mi citos neniu apartan nomon. Mi devas fari escepton nur por nia kamarado Van der Biest, kies nomo estas ankoraŭ tro

freŝa en la memoro de ni ĉiuj, kiu en la pasinta jaro aranĝis kaj prezidis nian grandan ĉiujaran feston, kaj kies morto estas sendube ligita kun tiuj grandaj laboroj kaj malagrablaĵoj, kiujn li prenis sur sin por ni ĉiuj. En via nomo mi esprimas funebran saluton al la ombroj de ĉiuj niaj karaj kamaradoj, kiujn dum la pasintaj dudek kvin jaroj forŝiris de ni la morto. Iliaj ombroj staru nun antaŭ niaj okuloj, kvazaŭ partoprenante en tiu granda festo, kiun ili preparis, sed ne ĝisvivis. Mi proponas al vi, ke ni honoru ilian memoron per leviĝo de niaj seĝoj.

Nun, kiam la matureco de nia afero estas jam tute eksterduba, mi turnas min al vi, karaj samideanoj, kun peto, kiun mi jam antaŭ longe volis direkti al vi, sed kiun mi ĝis nun prokrastis, ĉar mi timis fari ĝin tro frue. Mi petas, ke vi liberigu min de tiu rolo, kiun mi, pro kaŭzoj naturaj, okupis en nia afero dum dudek kvin jaroj. Mi petas vin, ke de la nuna momento vi ĉesu vidi en mi



La kongresanaro en la 8. Kongreso Esperantista en Krakovo en 1912

“majstron”, ke vi ĉesu honori min per tiu titolo.

Vi scias, ke tuj en la komenco de nia movado mi deklaris, ke mi ne volas esti mastro de Esperanto, sed ke la tutan mastrecon pri Esperanto mi en tuta pleneco transdonis al la esperantistoj mem. Vi scias ankaŭ, ke de tiu tempo mi ĉiam lojale agadis aŭ almenaŭ penis agadi konforme al tiu deklaro. Mi donadis al vi konsilojn, kiel mi povis, sed neniam vi aŭdis de mi la vortojn “tion mi postulas” aŭ “tion mi deziras”. Neniam mi provis altrudi al vi mian volon. Tamen, konsciante, ke ĝis sia plena fortikiĝo nia afero bezonas ian enkorpigitan standardon, mi – laŭ via deziro – dum dudek kvin jaroj plenumadis tiun rolon, kiel mi povis, kaj mi permesadis, kvankam tre nevolonte, ke vi vidu en mi ĉefon kaj majstron. Kun ĝojo kaj

fiereco mi konstatas, ke vi ĉiam montris al mi sinceran konfidon kaj amon, kaj pro tio mi eldiras al vi mian plej koran dankon.

Sed nun permesu al mi, ke mi fine formetu de mi mian rolon. La nuna kongreso estas la lasta, en kiu vi vidas min antaŭ vi; poste, se mi povos veni al vi, vi ĉiam vidos min nur inter vi.

Jen estas la kaŭzo, kiu devigis min fari la nunan decidon:

La ekzistado de ia natura konstanta ĉefo, eĉ se tiu ĉefo havas nur la karakteron de unuiganta standardo, prezentas gravan maloportunaĵon por nia afero, ĉar ĝi donas al la afero kvazaŭ personan karakteron. Se al iu ne plaĉas mia persono aŭ miaj politike-religiaj principoj, li fariĝas malamiko de Esperanto. Ĉion, kion mi persone diras aŭ faras, oni ligas

kun Esperanto. La tro honora titolo de majstro, kiun vi donas al mi, kvankam ĝi en efektiveco koncernas nur la aferon de la lingvo, fortiras de Esperanto multajn personojn, al kiuj mi pro ia kaŭzo ne estas simpatia kaj kiuj timas, ke, fariĝante esperantistoj, ili devus rigardi min kiel sian moralan ĉefon. Ĉiu, kies opinio pri aferoj esperantistaj estas alia ol mia, ofte sin ĝenas eldiri libere sian opinion, por ne kontraŭbatali publike tiun, kiun la esperantistoj nomas sia majstro. Se ies opinio la esperantistoj ne volas akcepti, li vidas en tio nur la ĉiopovan influon de la majstro. Nun, kiam nia afero estas jam sufiĉe forta, estas necese, ke ĝi fine fariĝu absolute libera, ne sole libera de ĉiuj personaj dekretoj, kia ĝi fariĝis jam antaŭ dudek kvin jaroj, sed ankaŭ de ĉia efektiva aŭ ŝajna persona influo. Estas necese, ke la mondo sciiĝu tute klare, ke Esperanto povas havi aŭ ne havi siajn libere elektitajn gvidantojn, sed ke ĝi posedas nenian konstantan majstron. Nomu min per mia nomo, nomu min fondinto de la lingvo, aŭ kiel vi volas, sed mi petas vin, ne nomu min plu “majstro”, ĉar per tiu morale tro liganta nomo vi malliberigas nian aferon.

Multaj el vi portas en sia koro la samajn idealojn, kiel mi, kvankam ne ĉiuj en tute egala formo; sed la mondo devas scii, ke tiu spirita parenceco inter mi kaj vi estas laŭvola, ke la esperantismo kaj la esperantistoj ne povas esti respondaj pri miaj personaj ideoj kaj aspiroj, kiuj por neniu el vi estas devigaj. Se mi ion diras aŭ faras, kio ne estas konforma al la gusto aŭ konvinkoj de tiu aŭ alia el vi, mi deziras, ke tio neniu el vi ĝenu kaj ĉiu el vi havu la rajton diri: tio estas tute privata ideo aŭ frenezaĵo de Zamenhof, kaj ĝi havas nenion komunan kun la esperanta movado, en kiu li estas nun persono tute privata. La interna ideo de Esperanto, kiu havas absolute nenian devigon por

ĉiu esperantisto aparta, sed kiu, kiel vi scias, plene regas kaj ĉiam devas regi en la esperantaj kongresoj, estas: sur neŭtrala lingva fundamento forigi la murojn inter la gentoj kaj alkitimigadi la homojn, ke ĉiu el ili vidu en sia proksimulo nur homon kaj fraton. Ĉio, kio estas super tiu interna ideo de Esperanto, estas nur privataĵo, kiu povas eble esti bazita sur tiu ideo, sed neniam devas esti rigardata kiel identa kun ĝi.

Antaŭ ol mi formetas de mi ĉian oficialan rolon en nia afero, mi ankoraŭ la lastan fojon admonas vin: laboru ĉiam en plena unueco, en ordo kaj konkordo. Ĉiujn dubajn demandojn, kiuj koncernas la tutan esperantan aferon, kaj kiuj ne tuŝas la personan liberecon de ĉiu aparta esperantisto, solvu ĉiam pace, per regula interkonsiliĝo de viaj egalrajte elektitaj delegitoj kaj per disciplina cedo de la malplimulto al la plimulto. Neniam permesu, ke en nia afero regu la principo: “kiu pli laŭte krias, tiu estas prava”. Per unueco ni pli aŭ malpli frue certe venkos, eĉ se la tuta mondo batalus kontraŭ ni; per interna malpaco ni ruinigus nian aferon pli rapide, ol tion povus fari ĉiuj niaj malamikoj kune. Ne forgesu, ke Esperanto estas ne sole simpla lingvo, kiun ĉiu el ni uzas nur por siaj propraj bezonoj, sed ke ĝi estas grava socia problemo, ke, por atingi nian celon, ni devas konstante propagandi nian aferon kaj zorgi pri tio, ke la mondo havu estimon kaj konfidon por ĝi. Se en nia afero aperas io, kio ŝajnas al ni malbona, ni povas trankvile ĝin forigi per komune interkonsentita decido; sed ni neniam semu en nia tendaro reciprokan malamon kaj malpacon, kiu nur ĝojigas kaj triumfigas niajn malamikojn. En la unuaj jaroj de nia laborado sur nia standardo estis skribitaj la vortoj “espero, obstino kaj pacienco”; tio tute sufiĉis, ĉar tio, ke ni, samideanoj, devas reciproke nin

estimi kaj helpi, tio por ĉiu estis komprenebla per si mem. En la lastaj jaroj ni bedaŭrinde ofte forgesis tiun devon; tial nun, transirante en la duan gravan periodon de nia historio, en la duan kvaronjarcenton, ni skribu sur nia standardo novan vorton, kaj ĉi tiun vorton ni ĉiam respektu kiel sanktan ordonon; tiu vorto estas: “*konkordo*”.

Mi finis tion, kion mi intencis diri al vi, karaj amikoj. Mi scias tre bone, ke multajn el vi mia nuna parolo malagrable seniluziigos. Kun maldolĉa sento de neplenumita espero vi eble demandos: ĉu en sia lasta kongresa parolo, en sia “kanto de cigno”, li nenion pli havis por diri al ni? ĉu en la grava tago de la jubileo de la esperantismo, de tiu jubileo, kiun ni atingis post tiom multe da laboroj kaj suferoj, li nenion pli havis por diri al ni? ĉu en la unua kaj eble ankaŭ la lasta fojo, en kiu ni el ĉiuj partoj de la mondo alproksimiĝis, kiom ni povis, al tiu loko, kie Esperanto naskiĝis kaj kie la atmosfero, saturita de intergenta malpaco, per neevitebla natura reago



Zamenhof, Berno 1913

naskis la esperantisman movadon, – ĉu en ĉi tiu grava kaj solena momento li nenion pli havis por diri al ni? Ho ne, miaj karaj amikoj, miaj karaj samideanoj kaj kunlaborantoj! Multe, multe, tre multe mi volus hodiaŭ diri al vi, ĉar mia koro estas plena; en la jubilea momento de la esperantismo mi volus paroli al vi pri tio, kio naskis la esperantisman, pri ĝia esenco kaj espereblaj sekvoj; sed hodiaŭ mi staras antaŭ vi ankoraŭ en rolo oficiala, kaj mi ne deziras, ke mia privata kredo estu rigardata kiel deviga kredo de ĉiuj esperantistoj. Tial pardonu min, ke mi pli ne parolas.

Kio estas la esenco de la esperantisma ideo kaj al kia estonteco alkondukas iam la homaron la interkompreniĝado sur neŭtrale-homa, sengenta lingva fundamento, – tion ni ĉiuj sentas tre bone, kvankam ne ĉiuj en tute egala formo kaj grado. Ni donu do hodiaŭ plenan regadon al tiu silenta, sed solena kaj profunda sento kaj ni ne profanugnin per teoriaj klarigoj.

Samideanoj! La antikva pola ĉefurbo, en kiu ni kunvenis, pretigis por ni gastaman akcepton, faris multe, por honori nian aferon kaj por agrabligi al ni nian restadon dum la kongreso. Mi esperas, ke, revenante en sian hejmon, ĉiu el vi kunportos kun si plej bonan rememoron pri tiu lando kaj urbo, kiujn la plimulto el vi ĝis nun verŝajne tre malmulte konis. Al la regno kaj lando, kiuj montris al ni sian amikecon, sed precipe al la estraro de la gastama Krakovo kaj al ĉiuj institucioj kaj personoj, kiuj donis al nia kongreso sian moralan kaj materialan subtenon, mi esprimas en via nomo plej koran dankon. Plej koran kamaradan dankon mi esprimas kompreneble antaŭ ĉio al la senlaca loka organiza komitato, kiu ne ŝparis laboron por la plej bona aranĝo de nia kongreso. Kaj nun mi deziras al vi ĉiuj gajan feston kaj sukcesan laboron.



Kiom ni povas lerni de Zamenhof hodiaŭ? – Neniom, iom, ĉiom!

de Renato Corsetti

Neniom!

Tio, en pli aŭ malpli milda formo, estis la respondo de homoj, kiuj sekvis la marksisman interpreton de la historio dum la tuta ekzisto-periodo de Esperanto. Ernest Drezen tute klare diras pri la kerna parto de la pensaro de Zamenhof, hilelismo aŭ homaranismo, ke laŭ marksisma vidpunkto homaranismo “kapablas nur fuŝi realan komprenon de la ekzistantaj socifortoj”, kaj en alia loko, ke “Por Zamenhof la kaŭzoj de mondmilito restis ne komprenitaj. Li ankaŭ ĉe la fino de sia vivo kapablis pensi nur pri lingvo neŭtrala kaj religio neŭtrala.”

Estas malfacile malpravigi Drezen, se oni legas la “Leteron al la diplomatoj”. Efektive Zamenhof certe ne estis marksisto. Laŭ mia kompreno tamen li estis bonkora socialisto, sed eĉ ne sciis, ke li estas tia. Liaj ĉefaj interesoj estis la rilatoj inter hom-grupoj, ne inter hom-tavoloj. Li estis ido de sia tempo kaj de sia naskiĝloko, ĉar li ĉie vidis etnojn batalantajn kontraŭ aliaj etnoj ne pro praktikaj motivoj, pro mono, potenco, regado, sed pro malsameco de lingvo kaj malsameco de religio. Li mem, kiel judo naskiĝinta en malbonŝanca parto de Eŭropo, en kiu furiozis intergenta batalado, interalie instigata por maski



Zamenhof en studejo en Dzika strato en Varsovio

la ekonomiajn interesojn kaj la verajn celojn de la regantaj klasoj, vidis nur tion kaj kredis, ke la kaŭzoj de tio estas lingvo kaj religio.

Tial li kreis Esperanton, ĉar laŭ lia penso, kiam la homoj interkompreniĝos per la sama lingvo kaj havos la saman religion, paco venos aŭtomate, aŭ almenaŭ multe pli facile. Mi kredas, ke por la legantoj de ĉi tiu revuo mi ne devas pravigi per multaj citaĵoj ĉi tiujn pensojn de Zamenhof. Sufiĉu nur unu el la Deklaracio pri Homaranismo: Mi estas homo, kaj la tutan homaron mi rigardas kiel unu familion; la dividitecon de la homaro en diversajn reciproke malamikajn gentojn kaj gentreligiajn komunumojn mi rigardas kiel unu el la plej grandaj malfeliĉoj...

Ne nur Drezen kaj la komunistoj pensis tiel, ankaŭ ĉiuj kapitalistoj kaj ĉiuj subtenantoj de la merkata ordo, pensas tiel, kaj ĉiutage riproĉas al ni: “Forgesu pri viaj utopioj. Atentu pri la konkretaj aferoj. La angla jam gajnis. Aliĝu al ĝi kaj forgesu pri genta, neŭtrala interkompreniĝo. Aliĝu al la fortuloj kaj al la sukcesuloj!” Tiuj homoj ne volas ion de Zamenhof. Ĉu, tamen, eble Zamenhof komplete malpravis? Ne tute, laŭ mi, kaj pro tio ni povas ankoraŭ lerni de li plurajn aferojn.

Iom!

Nacia aparteno kaj lingva aparteno estas ankoraŭ potencaj faktoroj en ĉi tiu nia mondo de la komenco de la 3-a jarmilo. Ĉu la ĉefaj militoj nuntempe okazantaj en la mondo ne estas pravigataj per religio? Ĉu oni ne daŭre ludas per islamo kaj per kristanismo klopodante krei militon inter religioj por kaŝi la verajn luktojn pri potenco, influo kaj petrolo?

Ĉu abomenindaj individuoj en eŭropaj kaj usonaj kompanioj ne ludas per etna aparteno por kaŝi militojn en Afriko kaj en la fino trompi la anojn de

ĉiuj etnoj kaj forrabi la krudajn materialojn, kiuj abundas en tiuj landoj? Ĉu aliaj abomenindaj individuoj ne kaŝis la intercivitajn militojn en la eksa Jugoslavujo por forigi socialismon de plia regiono kaj krei propran pli facile regeblan sud-orient-eŭropan teritorion? Ne diru, ke mi rakontas fabelojn, kaj ke via televida stacio ne konsentas kun mi. Bonvolu legi la plej aŭtoritatajn gazetojn de la mondo aŭ revuojn de politikaj analizoj.

De Zamenhof ni povas lerni esti malneŭtralaj pri tiaj aferoj. Memoru pri lia fest-parolado dum la dua kongreso en 1906. “Sinjorinoj kaj sinjoroj! Ĉe la malfermo de nia Kongreso vi atendas de mi ian paroladon; eble vi atendas de mi ion oficialan, ion indiferentan, palan kaj senenhavan, kiel estas ordinare la oficialaj paroloj. Tiam paroladon mi tamen ne povas doni al vi. Mi ĝenerale ne amas tiajn parolojn, sed precipe nun, en la nuna jaro, tia senkolora oficiala parolo estus granda peko de mia flanko.” Kaj memoriginte pri la amas-buĉadoj en Okcidenta Rusujo kaj Kaŭkazo li parolas pri tiu “aro da abomenindaj krimuloj, kiuj per diversaj kaj plej malnoblaj rimedoj, per amase dissemataj mensogoj kaj kalumnioj arte kreas teruran malamon inter unuj gentoj kaj aliaj.” Ĉu vi ne vidas hodiaŭajn paralelaĵojn? Ĉu vi pensas, ke pri similaj hodiaŭaj okazaĵoj la prezidanto de UEA rajtus paroli same?

Mi mem fieras lerni de Zamenhof kaj laŭeble apliki lian sintenon al la nuntempaj okazaĵoj internaciaj. Neniam en sia posta historio la Esperanto-movado aŭ UEA atingis tian altan moralan partoprenon en gentaj tragedioj.

Pli ĝenerale ni diru, ke ankoraŭ nun lingvo kaj religio (aŭ ĝia nuna ekvivalento) estas potencaj faktoroj de internacia politiko, armiloj en la manoj de la regantaj klasoj kaj landoj. Nuntempe kun la struktura regado de difinitaj

landoj kaj klasoj kuniras la lingvo de la plej potenca lando kaj la religio pri la merkato kiel solvo de ĉio. Tiuj, kiuj ne akceptas tiun lingvon kaj tiun religion, estas deklarataj malamikoj de la socio. Tiu estas unu el la kialoj de la malfacilo antaŭenpuŝi Esperanton. Zamenhof pri tio pravis: lingvo kaj religio estas faktoroj gravaj kontraŭ kiuj Esperanto batalas.

Ĉiom!

Mi kredas, ke oni devas respondi tiel, se oni konsideras Zamenhof-on kiel homon kaj kiel esperantiston. Liaj homaj kvalitoj estas konataj al ĉiuj legantoj: mildeco, hom-amo, helpemo, humileco. Lia intuicio pri lingvaj aferoj, lia instinkta kompreno, kiel lingvoj funkcias en la kapo de normalaj homoj, estas ankoraŭ nun gvidaj linioj por tiuj, kiuj volas kompreni Esperanton kaj ĝian sukceson. Neniu lingvisto, kiom ajn fama, sukcesis krei kaj vivi lingvon vivopovan. Neniu alia gvidanto de la Esperanto-movado sukcesis samtempe gvidi kaj havi la entuziasman subtenon, kiun li ricevis. La Ido-skismo nur refortigis la “simplajn” esperantistojn, kiuj ariĝis ĉirkaŭ li.

Eble lia atento al ĉiuj esperantistoj, eĉ al la plej simplaj kaj malproksimaj, estis unu el la trajtoj de lia gvid-maniero. Memoru pri tio, ke li rakontis en la inaŭgura parolado en la 2-a Universala Kongreso en Ĝenevo pri la “malriĉa instruistino, kiu longan tempon suferis malsaton, nur por ke ŝi povu ŝpari iom da mono por la propagando de Esperanto”. Evidente li havis kontakton kun ĉiuj malriĉaj instruistinoj en la movado, kiuj ne timis informi lin pri siaj problemoj. Ĉu la tuta mondo ne estas plena je la poŝtkartoj de Zamenhof? Kopio de unu el ili eĉ pendas en mia kuirejo, kaj oni deĉifras la vortojn: “12/V/1912 La junajn geedzojn kore gratulas L.L. Zamenhof”. Tio signifas, ke inter tradukado de Hamleto kaj de la Biblio li prenis tempon por respondi al informo pri geedziĝo, kiel li respondis al ĉiuj petoj, kiuj venis al li. Li ne konsideris sin tro grava por tio kaj eble pro tio li estis granda.

Ni ĉiuj devus lerni ĉiom el la homaj kaj esperantistaj ecoj de Zamenhof.

Kun permeso redonita de UEA-revuo
Esperanto n-ro 12, 2009



96-a UK en kongresejo Bella Center, Kopenhago 2011

Dana lingvisto Rasmus Rask

de Jens Stengard Larsen



Parolado okaze de la Zamenhofa tago, Kopenhago la 15.12.2010

Oni petis min diri ion pri la familio de Zamenhof, sed familio povas esti multaj malsamaj aferoj. Ekzemple nia Ludoviko ankaŭ estas membro de la familio de lingvokreintoj. Mi ŝatus rakonti al vi pri unu el la pli interesaj danaj lingvokreintoj, nome Rasmus Rask (1787-1832).

Rask estas unu el la plej famaj lingvistoj de ĉiuj tempoj. Li naskiĝis en Fueno en 1787 kaj mortis nur 55-jara en Kopenhago. Oni ankoraŭ nekredible multe skribas pri li. Pasintjare eĉ aperis romano pri li – “Rudimenter af R” (Rudimentoj de R) de Hanne Marie Svendsen. Rask laboris pri multaj lingvoj, kaj li ankaŭ opiniis, ke oni povus fari internacian lingvon. Povas esti interese vidi kiel li longe antaŭ Zamenhof, venis al la ideo, ke tia lingvo estas havinda kaj farebla.

Por serĉi la plej profundajn radikojn de la dana lingvo, Rasmus Rask faris grandan vojaĝon al Hindio tra Rusio, kun longaj haltoj en Stokholmo kaj Sankt Peterburgo. En Peterburgo li rimarkis, ke oni tie tute ne konas la danan literaturon. Tio tre ĉagrenis lin, sed precipe ĉagrenis lin ke la germanaj intelektuloj, kiuj estis multaj en la rusa ĉefurbo, tute malestimis la skandinaviajn literaturojn.

En unu el siaj leteroj hejmen, li priskribis unu el la konversacioj, kiujn li havis kun germana profesoro: “Kial vi ne skribas germane anstataŭ dane?” – “Ĉar ni ne estas germanaj, sed danaj.” – “Dio mia, kia ideo estas tio, fari

literaturan lingvon el tia dialekto, kiun parolas apenaŭ unu miliono da homoj, kio povos fariĝi el tio?”

Ĉe senpartiaj juĝantoj tio nin des pli honoros, ju pli malgrandaj ni estas, kiam ni tamen sukcesis doni al nia lingvo literaturon, kiu ne malsuperas tiujn de dekoble pli grandaj lingvoj.

Vi ja ĉiuokaze havas ĝermanan devenon, estas do el bona tribo, sed kia strebo estas tio, apartigi sin el la granda tuto? – La dana nacienco estas proksimume la sama kiel la germana, kaj ni ankaŭ ne disigis nin el iu granda tuto, sed nur asertis la starpunkton kiun indikis al ni la naturo, kaj kiun ni, mi esperas, ankoraŭ dum kelka tempo asertos.

Estas iom surprize ke Rask venis al la ideo fari internacian planlingvon, ĉar laŭ li, la lingvo estas natura fenomeno. Sed kvankam Rask estis patrioto, li ne estis naciisto. Li defendis ĉiujn pli malgrandajn naciojn kontraŭ la pli grandaj – ne nur la dana kontraŭ la germana.

Ekzemple, en unu el siaj leteroj hejmen, li priskribas la diversan sorton de la finnoj, la estonoj kaj la ingroj. La ingroj estas la finna popolo kiu origine loĝis sur la teritorio de Sankt Peterburgo. Finnlando tiutempe estis parto de la rusa regno, sed kiel memstara grandduklando. La kleruloj parolis svede aŭ finne. En Estonio la kleruloj parolis nek estone, nek ruse, sed germane. Rask tre subtenis la evoluigon de la finna lingvo, kiu tiutempe komencis prosperi, kaj li multe bedaŭris la sorton de la estonoj, kaj precipe de la ingroj.

En Peterburgo Rask multe laboris por interesi la rusojn pri la danaj lingvo kaj literaturo, kaj fakte li ricevis unu diligentan disĉiplon, nome profesoron Ivan Lobjko. Ni scias ke Lobjko tre bone lernis la danan, ĉar poste li skribis al Rask kaj aliaj danoj kelkajn leterojn, kiuj estas konservitaj.

En 1822 Lobjko translokiĝis al Vilno, la nuna ĉefurbo de Litovio. En longa letero al Rask li priskribas la tiean lingvan situacion:

Mia loĝloko estas tre interesa al lingvoesploristo. La nordan parton de la vilna gubernio konsistigas Ĵemajtio. La dialekto de ĉi tiu regiono estas branĉo de la litova. En la suda parto de la gubernio, ĉirkaŭ Grodno, Minsk kaj Vitebsk, kelkloke troviĝas disaj vilaĝoj de litovoj kiuj ankoraŭ parolas litove. Cetere la homoj tie parolas “wasserrussisch”, same kiel ankaŭ en Bjalistoko. La praloĝantoj do estas aŭ litovoj aŭ rusoj; la nobeloj male estas poloj, kaj ili interrilatas kiel estonoj kaj germanoj, aŭ finnoj kaj svedoj.

Tiu dialekto, kiun Lobjko nomas “wasserrussisch” aŭ “akva rusa”, estas tiu miksaĵo de la pola kaj rusa, kiun oni nuntempe nomus belorusa. Mi opinias,



Dana lingvisto Rasmus Rask (1787-1832)

ke tio estas tre interesa informo pri la lingva situacio en la regiono de Bjalistoko dum la 19-a jarcento.

En Rusio Rasmus Rask do spertis kiel la lingvoj povas konflikti inter si. Sed en Sankt Peterburgo li ankaŭ ofte havis la okazon paroli ĝis ses malsamajn lingvojn en unu tago. Rask estis treege lingvolerta, sed konstante jongli inter ses lingvoj estis iom multe eĉ por li. Li do sincere ekinteresiĝis pri neŭtrala, tuthomara lingvo, en kiu li povus skribi legeble por ĉiuj, ne perfidante sian nacion. Li komencis labori pri tio, kaj tra la tuta vojaĝo li laboris pri ĝi, kiam estis liberaj momentoj en la studado de la aliaj lingvoj.

Rask nomis sian lingvon “linguaĵ generale” aŭ “linguaĵ universale”. Ĝi neniam ricevis difinitan nomon aŭ difinitan formon. Ŝajnas ke li neniam parolis kun iu pri sia projekto. Reveninte al Kopenhago li fine rezignis; komence de la manuskripto, kie li skizas sian lingvon, li skribis: “In magnis voluisse sat est” – tio estas latina citaĵo kiu signifas “En grandaj aferoj sufiĉas esti volinta”. Li ne povis scii, ke precize en la centa jaro post lia naskiĝo aperos Esperanto. Li sendube estus tre simpatia al Esperanto, ĉar ĝi estas konstruita tute laŭ liaj ideoj pri internacia lingvo.

Ĝis nun la biografiistoj de Rask flankenŝovis lian lingvoprojekton kiel ion neesenca. Sed en la lasta biografio, de Kirsten Rask en 2002, estas subĉapitro pri ĝi. En la longa daŭro oni ne povas ignori la lingvoprojekton de Rask. Al ni esperantistoj kompreneble estas interese, ke li laboris pri la sama afero kiel Zamenhof, kaj jam en 1916 aperis artikolo pri tio en la esperanta gazetararo. Sed la fakto ke li laboris tiel serioze pri la demando, kvankam li rigardis la lingvon kiel natura fenomeno, ankaŭ estas lingvistike tre interesa, kaj mi esperas mem kontribui al tio dum la venonta jaro.

96-a UK en Kopenhago

de Ole Therkelsen



De sabate 23.07 ĝis 30.07.2011 el 66 diversaj landoj venis 1458 esperantoparolantoj al Bella Center en Kopenhago por partopreni en la 96-a Universala Kongreso de Esperanto. Oni tuŝis la rekordon, ĉar la kvaran fojon Kopenhago estis gastiganto de la UK (1956, 1962, 1975, 2011). Ekde la unua mondkongreso en 1905 nur du urboj estis gastiganto kvarfoje. Vieno estis gastiganto en 1924, 1936, 1970 kaj 1992.

La partoprenantoj ĝuis la bonan etoson kaj forgesis la pluvon (kelkfoje torentan pluvegon) en Kopenhago. Entute la kongreso estis tre sukcesa. Kiel kutime estis granda programo kultura, klera, distra, ekskursaj kaj faka. La temo de la 96-a UK en Kopenhago estis dediĉita al la Internacia Jaro de Junularo, proklamita de Unuiĝintaj Nacioj. UN donis al ĝi la temon “Dialogo kaj interkompreno”, kiun la Estraro de UEA adoptis ankaŭ kiel la temon de la ĉi-jara UK. Memevidente la temo estas tre grava por la estonta bonfarto de la Esperanto-movado.



Dimanĉe post la Solena Inaŭguro en Bella Center kaj la Ekumena Diservo en Katedralo de Kopenhago (Københavns Domkirke) sekvis la danan aŭnacion vesperon en la koncertejo de Tivoli – la mondkonata plezurejo. La programo estis mallonga vojaĝo tra la dana kaj gronlanda kulturoj: unue la sveda Martinus-preleganto Ingemar Fridell ludis muzikaĵojn de la dana komponisto Carl Nielsen, poste ni aŭskultis danajn kantojn kun la kantistino Ulla-Mir Renöfält (kiu ankaŭ interesiĝas pri la kosmologio). La gronlanda koruso Aavat distris nin vestita en ĉarmaj, kolorbrilaj popolkostumoj kun molaj gronlandaj kantoj kaj tambura danco. La vespera finalo estis bonkvalitaj baletoj de la Pantomima Teatro de Tivoli. Bela vespero endoma – sed tre, tre malsekega eksterdoma.

En la unua kongreso en Kopenhago en 1956 la solena inaŭguro ankaŭ okazis en Koncertejo de Tivoli. (Vidu noktan foton de Tivoli antaŭ turo de kopenhaga urbodomo).

La unuan sabaton estis “Movada firo”, kie en budo n-ro 20 oni informis pri la kosmologio kaj disdonis kosmologiajn broŝurojn kaj provnumerojn de Kosmos. Dimanĉe Ole Therkelsen dufoje prelegis pri famaj danoj, pri H.C. Andersen kaj pri la fiziksitoj Ole Rømer, H.C. Ørsted kaj Niels Bohr kun kelkaj mencioj pri Martinus. Marde Ole prelegis pri “La dana filozofo Martinus kaj lia verko” por 80 aŭskultantoj. Post la prelego multe da interesuloj prenis broŝurojn kaj diversajn informilojn pri Martinus kaj la kosmologio.



Universala Esperanto-Asocio

en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko

Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando

☎+31 10 436 10 44 📠+31 10 436 17 51

Kongresa statistiko: 1458 aliĝintoj al la 96-UK en Kopenhago (23-30 julio 2011).

Laŭ nombro de partoprenantoj estis franca-germana duelo en la statistiko. Pri la unua loko konkurencas Francio kaj Germanio, dum Danio troviĝis nur sur la kvara loko, ĉar ankaŭ Japanio liveris pli da aliĝoj ol la gastiganta lando. La landoj kun pli ol 50 aliĝintoj estis: Francio (174), Germanio (140), Japanio (103), Danio (88), Pollando (69), Nederlando (62), Brazilo (60), Italio (57), Rusio (56) kaj Svedio (53).





Martinus 7

La religieco de la estonteco

de Erik Gerner Larsson

Dum la religiaj idealoj de la estinteco hodiaŭ sub formo de aŭtomata funkcio sin montras en la vivmaniero de preskaŭ ĉiu homo, tamen estas alia afero, kiam temas pri la idealoj, sur kiuj la morala vivo de la estonteco bazo. Dum la idealoj de la estinteco kun ilia senpera rilato al la leĝo de la besta regno: *potenco antaŭ rajto*, tute simple enradikiĝis en la konscian vivon de ĉiu aparta homo, tute ekster la funkcio de la inteligento, nur firme ligita al la nedifinita sento, neniu el la idealoj de la estonteco realiĝos ekster la pensado, la analizo. Esenca diferenco el nemezurebla amplekso tiamaniere aperas. La religia vivo de l'estinteco – de la fetiĉa adorado ĝis la multspecaj formoj de la kristanismo, mohametanismo kaj budhismo – ne estas esprimebla en pensobildoj, kies logiko estas senpere komprenebla. La nebuloj de la sento kovras ĉion. Malantaŭ ĉiuj oni sentas la ekziston de grandegaj veroj, sed oni ne vidas ilin en la hela lumo de la tagkonscio. Egale de kiu flanko oni penadas proksimiĝi al ili, oni renkontas ĉe ĉiuj la postulon: vi devas kredi! “La vojoj de la Sinjoro estas neesplorableblaj”, diras la keruboj, “ŝtonoj anstataŭ pano”, ĝemas tiu animo, en kies konscio la malsatanta inteligent-korpo sopiras je kompreno.

La religia vivo de la estonteco ne povas bazi en nedifinitaj, nebulaj penso-bildoj. Same kiel la progresanta homo en la tiel nomata *materia* vivo

renkontas klarajn logikajn respondojn al logikaj demandoj, tiel ankaŭ en tiu medio, kiun oni nomas la *spiritan* ĝi devas havi saman eblecon ricevi logikan percepton. “Vi amu vian proksimulon tiel, kiel vi amas vin mem”, devas fariĝi scienco, aŭ ĉi tiu ordono restos utopio.

Ĉu ĉi tiu ordono do povos fariĝi scienco? Absolute jes! Dum la pure materiaj medioj iom post iom estas traesploritaj kaj precizigitaj, la mensa mondo kiu estas la mondo de la sur tero vivanta homo, ankoraŭ ripozas en neesplorita, netuŝita stato. Sed sen esplorado neniu scio, kaj sen scio neniu vera amo. Nur tion, kion oni konas ĝisfunde, oni povas ami. Kaj neniu percepto atingis ĉi tiun celon, antaŭ ĝi mense fariĝis evidenta, ke “Ĉio estas tre bona”. Sed la absoluta ekzistrajto de ĉio nur evidentiĝas al tiu, kies spirita sopiro atingis tiun staton, ke ĝi inspirita de interna nekontraŭstarebla forto sentas la devon serĉi la absolutan veron.

Atenginte ĉi tiun stadion la vivanta estulo renkontos la kosmajn analizojn, kies apero en klaraj logikaj sinsekvaj penso-vicoj, bazitaj ne sur kredo, sed sur absoluta scio, permesas al ĝi proksimiĝi al ŝtupo de la dieco mem, de kie ĝi ĵetas rigardon super la mondon, kies laŭleĝeco estas tiel giganta, ke eĉ ne “pasero falas teren, se ne estas la volo de Dio, kiu plenumiĝas!”

Tradukis Margrethe Noll en 1939

Postkongresa semajno en Martinus-Centro

En la semajno post la 96-a UK en Kopenhago estis esperanta semajno en Klint kun 16 partoprenantoj el Rumanio, Litovio, Rusio, Hispanio, Usono, Svedio, Norvegio kaj Danio. Plurfoje dum la semajno Mathias Dalmose kaj Jonas Dalmose interpretis skandinavajn prelegojn kaj Ole prelegis rekte en esperanto.

Estis multaj danaj, svedaj kaj germanaj studgrupoj en Klint dum la somero. En la grupo, kie oni parolis la anglan, estis partoprenantoj de Hindio, Ĉinio, Usono, Britio, Nederlando kaj Danio.

/Ole Therkelsen



La angla studgrupo en Klint

Saluto de Javier Romero Tello el Hispanio

En ĉi tiu somero mi unuafoje partoprenis en la internaciaj kursoj en Martinus-Centro en Klint. Mi nur povas diri, ke estis mirinde partopreni en la esperanto-grupo. Ĉe la sama tablo sidis viroj kaj virinoj el pli ol sep landoj kaj aŭskultis pri la Martinus-Kosmologio pere de la voĉo kaj vortoj de Ole Therkelsen.

Pere de Esperanto kaj la Kosmologio, sur neŭtrala lingva fundamento komprenante unu la alian, ni fariĝis kaj fariĝos en kunsento unu granda familia rondo. Ĝis la bela revo de la homaro por eterne bene efektiviĝos! – Koran dankon kaj fortan ĉirkaŭbrakon al ĉiuj – *Javier*.

INFORMO PRI LA TRIA TESTAMENTO

La celo de la revuo Kosmos estas doni enrigardon en tiun mondbildon, kiun la verkisto Martinus (1890-1981) priskribis en vico da libroj kun la kumuna titolo: La Tria Testamento.

La mondbildo de Martinus estas logika analizo de la spiritaj leĝoj kaj principoj de la vivo. La nova mondbildo estas studebla per la libroj de Martinus, kiuj eldoniĝas de la Martinus-Instituto, kaj per prelegoj, kursoj, studrondoj kaj informoj en la Interreto. Okazas aktivecoj en la Martinus-Instituto en Kopenhago, en la Martinus-Centro en Klint ĉe Nykøbing Sjælland, en aliaj lokoj en Danio kaj eksterlande. Pliajn informojn oni ricevas kontaktante la Martinus-Instituton. La disvastiĝo de la konoj pri La Tria Testamento okazas sen ia formo de membreco aŭ kreado de asocio.

La frontpaĝa bildo: Lost Horizon

Eldonanto: Martinus-Instituto
Mariendalsvej 94-96
DK-2000 Kopenhago
Tel: (+45) 38 34 62 80
fakso (+45) 38 34 61 80
Telefontempo:
lundo-ĵaŭdo 13-16
vendredo: 9-12
DK p.ĝiro 642-9580
UEA-kodo mins-d
www.martinus.dk
esperanto@martinus.dk
shop.martinus.dk

Redakcio: Ole Therkelsen (respondeca),
Helen Claesson kaj Jonas Dalmose.
Kompostado: Dan Elhaŭge.

Abono: Jare 2 ekzempleroj
Prezo en EU: DKK 75,00 aŭ EUR 10,00
Prezo ekster EU: DKK 60,00 EUR 8,00
aŭ USD 12,00

Unuopa kajero: DKK 40,00

Se vi ne povas pagi per fremda valuto, demandu al la Instituto

Kopirajto: © Martinus Institut
Redono de teksto nur laŭ skriba permeso.
ISSN 1600 41 16.



La Kosmologio de Martinus

La kosmologio de Martinus estas spirita scienco. Ĝi priskribas la eternajn principojn, leĝojn kaj bazajn energiojn, kiuj fundamentas la spiritan kaj fizikan mondojn. Laŭ kosma konscio ĉio estas viva, eĉ de la atomo en mikrokosmo, de plantoj, bestoj kaj homoj en mezkosmo al galaksisistemoj en makrokosmo. La universo estas unueca organismo, viva estulo.

La mondo ĉiam evoluas. Por kompreni la evoluon de besto al homo oni bezonas la pensojn pri reenkarниĝo, sorto kaj karmo. La homaro nun spertas suferojn kaj malmumon. Iom post iom tio kaŭzas en ĉiu homo evoluon al logika pensmaniero, al pli humana sinteno kaj homama kapablo. Tio estas la provizora celo de la evoluo.

La plej gravan instruadon donas al ni la vivo mem. Ni ĉiuj estas naturaj membroj de tiu lernejo. Tial la kosmologio de Martinus ne havas iajn ajn membrecon, unuiĝon aŭ asocion. Sed ĝi celas doni al la unuopa homo komprenon pri la eternaj vivleĝoj, kaj helpi al ĉiu intereso fariĝi memstara kaj kapabla mem vivi homame, logike kaj tolereme.

Pro komenciĝanta amkapablo la homaro iam forlasos la bestoregnon kaj la mortigan principon kaj kreas internacian, pacan mondregnon.

Studado de la kosmologio donas al vi helan kaj optimisman vivkomprenon



Esperanta Grupo en Martinus Center, Klint, Danio.
Postkongresa semajno 30.07 - 06.08.2011